Heinrich Binder,

Ĉe l' kronmastro

tradukita de Joachim Gießner

Ĉe l'Kronmastro estas jubila dancad',
de bela Katrinjo edziĝa festad'.
Kaj sonas muziko, ĝojkria ridad',
la buloj vaporas por ĉies malsat'.

Kristjano nun sidas ja ĉe la pastor',
papavruĝe ardas ŝi, lia trezor'.
La kvara nur estas, konstatas nun li,
kaj daŭros ĝis sepa la fest' tie ĉ

.....
.....
.....
.....

Subite trankvilo, muzika fanfar',
sekrete forfuĝis la junedza par'.
Knabinoj konfuze parolas ne plu,
dancsvingas nun ilin la knaboj kun ĝu'.

Kvieta la nokto, arĝenta la lun',
lastfoje la festgastoj ronddancas nun.
Kaj ili finfine ripozas ja, dum
ĉe l'Kronmastro nun estingiĝas la lum'.

...

Traduko de la Germana poemo "Beim Kronenwirt" de Heinrich Binder en Esperanton de Joachim Giessner *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-612-1231 (2012-10-15 19:11:51)

Tiu ĉi traduko troviĝas en `C:\Users\manfredo\Documents\kanto-tradukoj deJ. Giessner.PDF`.